# Uzo de refleksiva pronomo kun “kun” kaj “kaj”

Eble vi memoras ke **sian, por sia, per sia, de sia, al sia**, **prepozicio+sia**) estas uzata **nur por komplementoj**.

Tamen atentu pri tiu problemo!

**k u n ≠ k a j**

Estas **prepozicio.** Ĝi anoncas ĉiam komplementon.


**Ne** estas prepozicio sed ligo-vorto. Ĝi povas ligi du komplementojn, sed ankaŭ du subjektojn.

Sekve de tio:

Oni povas diri **kun sia**
Oni povas diri **kaj sian**
Oni **ne** povas diri kaj sia, krom se la frazo funkcias kun prepozicio kaŝita.


=====================================

**Ekzemploj**:



*Eva **kun sia** fratino legas.*

=====================================



*Eva **kaj ŝia** fratino legas*

=====================================



*Eva manĝas **sian** pomon kaj sian piron.*

=======================================



Eva manĝas **per sia** forko kaj sia tranĉilo



(kaŝita prepozicio)

=======================================

**Ekzerco:**

La hundino ludas kun … ido.

La hundino kaj … ido estas amuzaj.

Eva estas kontenta, ĉar … hundino ludas kun … ido .

Nun la hundino kaj … ido manĝas … supon .

La bestoj estas kontentaj pro … supo kaj … ostoj.